







№ 04
1970

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviista



23-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

MARIBOR (Jugoslavio), 15.-21. Majo 1971-a

Sub la aŭspicioj de F.I.S.A.I.C.

KONSTANTA ADRESO: 23-a Kongreso de I.F.E.F., 62-000 MARIBOR, Jugoslavio.

BANKKONTO: 518-620-1-32002-10/181 KB Maribor, Jugoslavio.

POŝTĈEKKONTO: 518-679-21063 Fervoja Esperanto-Societo, Maribor.

-----oooOooo-----

KONGRESKOTIZO: Ĝis 31.I.1971: 100 dinaroj (8 Usonaj dolaroj)

Post 31.I.1971: 125 dinaroj (10 Usonaj dolaroj)

Familiano, pensiulo, junulo ĝis 21 jaroj pagas duonon.

Simbola aliĝo: 25 dinaroj (2 Usonaj dolaroj)

LOKA KONGRESA KOMITATO

PREZIDANTO: Pratinemer Alojz, Direktoro de FERSPED, Maribor Tel. 458 ĤAT

VIC-PREZIDANTO: Lukner Franc, TP Maribor Tel. Ĥat 280

SEKRETARIO: Prebil Ludovik, Tomanova 19 Maribor

KASISTINO: Keĉek Ida, Fervojestacio Maribor Tel. ĤAT 122

KULTURAJ ARANĜOJ: Prelog Joĝe, Ljubljana Tel. 56-607

LOGIGA SERVO: Mirkoviĉ Jovan, SV Maribor Tel. Ĥat 323

GAZETARA SERVO: Ĝivoje Marinko kaj Zupaniĉ Josip, Zagreb Tel. ĤAT 375

INFORMA SERVO kaj Kunordigo de la laboro: Lipiĉar Mira; Ljubljana Tel. ĤAT

42-77 kaj Maraŝeviĉ Milivoje, Fervojestacio Maribor Tel. 424

JUNULARAJ AFEROJ: Zadravec Janez, SNG Maribor Tel. 21-476 (centralo).

55-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

VIENO, 1-8 de aŭgusto 1970-a

=====

Post la agrabla interkona vespero, sabate, en la Sofiensäle, kongresujo de 55-a U.K., dimanĉon matene la 2000 gepartoprenantoj el 44 landoj kolektiĝis en la salonego de Stadthalle por la solena inaŭguro.

Kiam en la salono eniris la Alta Protektanto de la Kongreso D-ro Franz JONAS, Prezidento de la Respubliko Aŭstrio, tondra longedaŭra aplaŭdo salutis Lin alvenon, kaj la infanoj de la 11-a Internacia infankongreseto, regalis Lin per buketo da floroj kaj bonvenigaj vortoj.

D-ro Leopold GRIMME, la Prezidanto de L.K.K. salutis kaj bonvenigis la honorajn gastojn. Prof-ro D-ro Ivo LAPENNA, en la nomo de U.E.A. kaj de la tuta kongreso bonvenigis la Prezidentan Moŝton de la Respubliko Franz JONAS kaj la reprezentantoj de diversaj Ŝtatoj kaj de la urbo Vieno.

D-ro Franz JONAS malfermis la Kongreson per sia esperantlingva parolado. Sekvis dankaj vortoj de la Prezidanto de U.E.A. al la Alta Protektanto Samideano JONAS pro la inspiraj vortoj per kiuj li bonvolis malfermi la kongreson; D-ro LAPENNA emfazis ke la unuan fojon en la historio de E-Movado Ŝtatprezidanto malfermis E-kongreson.

Sekvis salutoj de reprezentantoj de registaroj inter kiuj la reprezentanto de la Itala Ambassadejo. D-ro LAPENNA, dankante, substrekis la fakton ke, de 16 oficialaj registaraj reprezentantoj, pluraj, inter ili, salutis en Esperanto. Sekvis salutoj de reprezentantoj de la Landaj Asocioj. Direktoro de C.O. de UEA D-ro Victor SADLER, informis ke la listo de Landaj Asocioj plilongiĝis pro akcepto de la du novaj Asocioj: Ĉeĥoslovakio kaj Irlando. Por Italujo parolis D-ro Umberto STOPPOLONI, FEI-Prezidanto.

Post muzika paŭzo de Fervoja Orkestro sekvis festparolado de Prof-ro D-ro LAPENNA prezidanto de UEA.

La tutan ceremonion, precipe la paroladon de Ŝtatprezidento JONAS, disaŭdigis vespere la Aŭstra Radio kaj Televido.

Posttagmeze en la belega "Minoriten-Kirche", plenplena da gekongresanoj, okazis la solena Meso en Esperanto kuncelebrata de katolikaj pastroj el 8 landoj, inter kiuj Pastro Robert KUNERT, el Innsbruck, kiu fariĝis pastro

antaŭ semajno, kaj donis al la ĉeestantoj sian benon kaj bildeton kun E-teksto. Predikis majstre Pastro Paruzel el Pollando.

Vespere en la granda salono de Sofiensäle okazis la AŬSTRIA VESPERO, bonego gvidita de S-ano Emil VOKAL; ĝi konsistis el serioza muziko kaj el folklor-kultura parto.

London okazis la unua Ĝenerala Kunveno de UEA sub prezido de S-ro WENSING, Vic-prezidanto de UEA. Estis pritraktita la estrara raporto. La raporton prezentis S-ro BECKER, ĝenerala sekretario de UEA. Post vigla debato oni fermis la kunsidon per salutoj de fakaj asocioj.

Posttagmeze okazis la kunveno de I.F.E.F. sub la prezido de D-ro Stefano BACSKAI kun la ĉeesto de Prezidanto S-ro Joachim GIESSNER kaj Sekretariino S-ino KRUSE de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio. Post ĝenerala trarigardo de la movado precipe en fervojista medio, sekvis faka prelego de Inĝ. Walter HUBER kaj Inĝ. Wilhelm HERMANN pri la raciigado de la fervojoj per aŭtomata kuplilo, kun filmprojekciado en Esperanto. Fermis la kunvenon D-ro BACSKAI kiu kun S-ro GIESSNER parolis pri la aŭtomata kuplilo kaj la faka instruado precipe de junaj fervojistoj. Fine la reprezentantoj de la novfondita Fervoja Esperanto-Grupo en Venecio, S-ano TARLINDANO kaj D-ro BOSCHIN, donacis simpatie al la IFEF-Prezidanto "gondolo"-n (tipa boateto uzita tra la Veneciaj kanaloj). Sama "gondolo" estis donacita al la aŭstria kolegoj. Bedaŭrinde la programo de la kongreso estis tro plena. Ni devis rapide forlasis la fervojistan kunvenon por atingi ĝustatempe la Urbodomon, kie en la mirinda fest-salonego, okazis la Oficiala Akcepto fare de la Urbestro de Vieno S-ro Bruno MARECH, al pli ol 2000 gekongresanoj.

Variaj manĝaĵoj, bongustaj vinoj, afablaj vortoj kaj muziko kun dancoj instigis la kongresanojn resti longe tie, sed.... la teatraj prezentadoj atendis nin. Rapide ni devis kuri al Raimundtheater kie okazis la prezentado de "Sybilla" monologo majstre kaj bonstila rolita de la Pola aktorino Karina WASKIEWICZ, kaj de "La Virina Regno", folkloraj kaj komikaj duakta komedio, prezentita de BULGARA ESPERANTA TEATRO.

Mardon, dumtago, la kutima amaso da Fakaj kunvenoj; ni partoprenis tiujn de filatelistoj (Prezidis S-ro T.A. ROUSSEAU el Francio) kaj Bibliistoj kaj Orientalistoj (Prezidis Prof-ro A. DURANTI el Italio), kiuj okazis viglaj debatoj.

Vespere en la salonego "ZAMENHOF" okazis la duan filprezentadojn. Oni prezentis Ludwig Van Beethoven okaze de la Beethoven-jaro, kaj sonfilmojn de FIAT en Esperanto, inter kiuj unu tute nova. Lunde vespere oni prezentis la konatajn Esperanto-filmojn pri Norvegaj Ŝtataj Fervojoj kaj kolordiapozitivokun sonoj de S-ro Hugo KRAUS pri la historio de Vieno.

Poste, junuloj kaj ne, dancis.

Merkrede la kutima tro abunda ero da kunvenoj. Posttagmeze ni partoprenis tiun de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista sub prezido de S-ro Walter MUDRAK el Vieno. Estis diskonigita enhavon de saluttelegramo de ĉefepiskopo Samideano D-ro Eduard MANCHEINER, Salzburg. Oni raportis pri la 2-a Internacia komuna kongreso de IKUE kaj KELI en Klagenfurt (Aŭstrio). La raportojn prezentis S-anoj Pastro A. CICCANTI (Italujo), Paroĥestro H. PARUZEL (Pollando) kaj K. DÜRRSCHMID (Aŭstrujo).

Vespere la Oficiala balo okazis en la salonoj Zamenhof kaj Grabowski de la kongresejo. Estis afabla atmosfero kaj plenplenaj salonoj kaj koridoroj, kvankam pro la troa varmo ĉiuj ŝvitis.

Ĵaŭdon, ekskursata tago; posttagmeze la italoj estis akceptitaj en la Itala Ambasadego, la historia Palaco "Metternich", kie la aferŝarĝito regalis per vermuto kaj gvidis nin tra la belegaj salonoj kaj ĝardeno.

Vespere literatura recitalo de Nikolaj RYTKOV kiu prezentis al la publiko la Sovetan verkiston Aleksandr Soljenicin.

Vendrede post la interesa prelego por I.S.U. de nia amiko D-ro Hideo SHIMODA: "Ĉu viro aŭ virino estas denaske destinita?", okazis la dua Ĝenerala Kunveno de UEA sub la prezido de S-ro E.CARLEN, Viceprezidanto de UEA. Temo: La Internacia Lingvo kiel instrumento por eduko al internacia konceptado de la mondo (okazo de la Internacia Jaro de Edukado). Vidu ankau raporton pri la konferenco de Maribor en tiu ĉi sama bulteno.

Raportis S-ro Markarian el Britujo kaj prelegis rektoro Holmut SONNABEND (Germanio). D-ro DAZZINI (Italio) raportis pri la nuna agado de la 3-a Kunordiga Pedagogia Konferenco en Maribor. Estas oficiala interkonsento en la venonta jaro, enkonduki Esperanton eksperimente samtempe en certa nombro da lernejoj en Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavio. Post tri jara instruado la ŝtataj komisionoj kontrolos la rezulton kaj decidus pri pliaj aranĝoj. Finfine la dua Ĝenerala Kunveno de UEA unuanime akceptis la rezolucion proponitan flanke de la estraro de UEA direktita al UNESKO pri la enkonduko de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj.

Vespere okazis Internacia Arta Vespere. S-ano VOKAL majstre enkondukis la diversajn erojn kiuj entenis Aŭstrian muzikon kaj kanton, Bulgarajn gekantistojn kaj geaktorojn, Japanajn gedancistojn kaj kantistojn. Finis la vespero Nikolaj RYTJKOV per sia sprita kaj altnivela recitalo.

Sabaton, 8-an de aŭgusto "SOLENA FERMO" de la 55-a U.K. de Esperanto.

Post omaĝo al la samideanoj mortintoj, Prof-ro Ivo LAPENNA, legis la du rezoluciojn faritajn de la Komitato: ili estis unuanime akceptita de la kongresanoj. Tuj poste S-ro WARINGIEN, aŭtoro de la ĵus aperinta Plena Ilustrita Vortaro, informis pri la rezultoj de la Belarta Konkurso, kaj S-ro TONKIN pri tiu de la Oratora Konkurso: al venkinto S-ro Duncan Charters (Brito vivanta en Usono) estis transdonita la pokalo "Ivo Lapenna".

La redaktoro de Esperantaj elsendoj de Pola Radio S-ro Pettyn, ricevis kiel danko, ekzempleron de Plena Ilustrita Vortaro.

Varmajn dankojn adresis D-ro LAPENNA al tuta L.K.K. de la Kongreso, al K.K.S. S-ro NEVAN, al D-ro SADLER, al la Gazetara Servo, majstre gvidata de amiko ĜIVOJA, al la organizantoj de Infana Kongreseto kaj fine plej kore al la Prezidento de la Respubliko kiu per Sia ĉeesto donis grandan prestiĝon al la Kongreso. Post la simbola transdonado de la kongresa flago al la gesamideanoj el LONDONO, kiuj organizos la venontan 56-an U.K., per la martelbato de la Prezidanto la kongreso fermiĝis.

Okaza stampo laŭ modelo de kongresa insigno estis abunde uzata de la poŝtofiĉejo dum la kongresa semajno. Interesatoj povos havi ekzempleron kontraŭ unu internacia respondkupono ĉe: Sekretario de I.F.E.A., Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA (Italio).

(informoj elĉerpitaj de bultenoj de Gazetara Servo) Germano Gimelli

XII-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO SKISEMAJNO

16a ĝis la 23-a.I.1971 en F-74. CHATEL - Francio

Chatel situas je 40 km. de Thonon-les-Bains en la alpoj, apud la landlino de Svislando. Oni atingas la vilaĝon, per fervojo ekde la stacidomo Thonon-les-Bains (linio Bellegarde-Annemasse-Evian), kaj poste per speciala aŭtobuso ĝis la hotelo.

Por la skiantoj, la vilaĝo havas 11 diversajn skiliftojn. Por la piedirantoj, multaj promenadoj estas eblaj. Alteco de la vilaĝo: 1200 metroj.

La hotelo estas en ligno, komforta, kun varma akvo, duŝo en ĉiu etaĝo, manĝo-salonoj kaj ripoz-salono. Ĉambroj kun 2-3-4 litoj. Partoprenantoj maksimume: 50 personoj. Adreso de la skisemajno: hotelo "La Chaumière" F-74 CHATEL (Francio). Sendu la aliĝilon antaŭ la 30-an de Novembro 1970 al la organizantoj:

Sekretariino: S-ino Josette BERNIER, Internacia Fervojista Esperanto

Skisemajno- U.A.I.C.F., 11 rue de Milan F-75 PARIS 9

Kasisto: S-ro Edmond WURMSER, Poŝtĉekkonto 53-17-62 PARIS (Francio)

Prezo por la tuta restado: Kompletaj pensio (sen trinkaĵo), speciala aŭtobuso kaj diversaj aranĝoj: 200 frankoj. La antaŭpago: 50 frankoj po persono, por unu semajno, ne estas redonebla se la aliĝanto ne partoprenos. Provizora programo: Ski promenadoj, skikonkurso, pied-promenado, lingva konkurso en nia internacia lingvo, alpa vespero, karnavala vespero, ktp.

La Francaj kolegoj organizos ankaŭ alian ESPERANTISTAN SKISEMAJNON kaj RENKONTIĜON DE INTERNACIA AMIKECO DE KOMENCANTOJ de la 6-a ĝis la 13-a de februaro 1971-a. Montodomo de la Urbo LYON en TOUSSUIRE apud St. JEAN DE MAURIEUNE-73.

Kelkaj Lyonaj Esperantistoj de F.F.E.A., S.A.T. kaj U.F.E. decidis renkontiĝi en internacia kaj sporta otoso. Ili alvokas ĉiujn anojn de esperantistaj Asocioj kaj ĉiujn kiuj deziras uzi neŭtralan lingvon por internaciaj rilatoj. Por 7 tagoj la proksimuma prezo estos 200 Fr. Frankoj (Loĝado, nutrado kaj organizado de la restado. Necesas enskribiĝi plej rapide, sendante 50 Fr. kiel antaŭpago. Parto estos redonita se la paginto rezignos. Por informoj kaj enskriboj skribu al: V. kaj M. HARPET, 3 Rue Sebastien Gryphe, F-69 LYON (7°), Francio.

INSTRUISTA INTERNACIA KONFERENCO EN LA KADRO DE
INTERNACIA EDUKA JARO DE U.N.E.S.K.O. 1970 EN MARIBOR, JUGOSLAVIO
de la 27-a ĝis la 31-a de julio 1970-a

La Konferenco kiun partoprenis delegitoj el 17 landaj sekcioj de ILEI (Aŭstrio, Britujo, Bulgarujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italio, Japanujo, Jugoslavio, Kanado, Suda Koreujo, Nederlando, Svedujo, Svisujo, Usono) pritraktis kiel ĉefajn temojn la eblecojn por la vastigo de la instruado de la Internacia Lingvo en diversaj landoj ĉu eksperimente ĉu ĝenerale. La laborkampo estis tre vasta. La konferenco okupis sin pri baza dokumentaro por uzo inter la neesperantistoj kaj oficialaj instancoj en ĉiuj landoj, plie pri la kreo de infangazetoj kaj infanliteraturo-kaj por doni al la infanoj la eblecon renkontiĝi en lokoj de Eŭropo kaj por uzi la scipovon de internacia lingvo Esperanto.

En la diversaj raporto de la landaj sekcioj de ILEI montriĝis ke Esperanto ĉiam pli trovas grandan atenton ĉe la politikaj kaj fakaj instancoj. Oni decidis starigi feriajn centrojn por gejunuloj inter 11 kaj 16 jaroj. La Konferencon partoprenis pli ol 120 personoj. La partoprenintojn salutis la Urbestro de Maribor, Mirko ZLENDER, substrekante la gravecon de Esperanto en interkompreniĝo de la homoj de la mondo.

Oni akceptis apartajn konkludojn kaj decidojn rilate bazan dokumentaron, infangazeton, feriajn centrojn, Internacian Pedagogian Revuon, televidan kurson de Esperanto (subteni klopodojn en Nederlando por la starigo de televida kurso de Esperanto), normigo de superaj ekzamenoj por esperanto-instruistoj, normigo de la lernejoj instruplanoj, lernolibroj k.s.

Gvidis majstre la Konferencon la estraro de ILEI: S-ro MARKARIAN (Britujo), Rektoro SONNEBEN (Germanujo) kaj D-ro DAZZINI (Italio).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

En januaro aperis la unua numero de Internacia Pedagogia Revuo, profesia organo por la Esperanto-geinstruistoj. Ĝi havas belaspektan formon kaj riĉan, valoran enhavon. Artikoloj de D-ro István Szerdahelyi, Carlo Minnaja, Claudio Bianco, Ricsei Balács, Catina Dazzini donas riĉan panoramon pri la diversmetodoj kaj didaktikaj sistemoj de instruado de matematiko, en elementaj lernejoj kaj en universitataj fakultatoj, de ekonomio en mezgradaj lernejoj, de internacia korespondado flanke de studentoj de nova fremda lingvo. Interesaj, do, kaj gravaj, helpem-artikoloj tiuj de I.P.R. Ĉiuj instruistoj bezonas tian revuon, kaj povos aboni al ĝi je la modesta prezo de 6 GM. Ĉe eldonejo Ludwig PICKEL, Postfach 2113 D-85 NÜRNBERG 2. Por Italio bonvolu vin turni al Prof-ino Catina DAZZINI Casella Postale 22 - MASSA (Italio).

ESPERANTO-UZADO EN LA MUZEO DE SPERLONGA (Italujo)

La arkeologia skulpta muzeo de Sperlonga (inter Romo kaj Napolo) donas detalajn klarigojn pri ĉiuj objektoj en itala lingvo kaj en Esperanto. Esperantistaj vizitantoj estas bonvenaj.

"LA PSIKANALIZO" - TEATRAĴO DE JEAN THIERRY

Trupo de francaj esperantistoj, sub reĝisorado de nia amikino Francine BALLAVEN el Parizo, ludis dum S.A.T.- Kongreso en Augsburg (Germanio) la teatraĵon de Jean THIERRY "La psikanalizo"-n.

Ni kiu bonege konis la valoron de la franca trupo, ĉar ĝi ofte ludis dum la fervojistaj kongresoj, kore gratulas S-ino Ballaven kaj S-ron Thierry kune kun nia amiko Michel AUDIBERT kiu ankaŭ rolis en la teatraĵo.

N I L E G I S

LITERATURA FOIRO - "Patrolo" de junaj esperantistoj inter la plej kapablaj kaj agemaj de Italio prezentis al la legantoj, novan gazeton "Literatura Foiro"-n. Ĝi entenas originalajn poeziojn de Nicolino ROSSI, la ofta venkinto de Belartaj Konkursoj, originalan prozon de Giorgio SILFER, tradukitajn poeziojn de PISONI kaj L. MINNAJA el verkoj de Giuseppe UNGARETTI, la ĵus mortinta fama poeto. La gazeto estas vere interesa kaj ĝi meritas esti diskonigita en kaj eksterlande.

Por abonoj turnu vin al: V.ARI, Casella Postale 544 - I-20100 MILANO. SOVETA UZBEKISTANO - La numero unu de tiu revuo, estas libreto-eldonita de Uzbeka Asocio de Amikeco kaj Kulturaj ligoj kun eksteraj landoj; ĝi entenas multajn artikolojn pri la evoluo de la Soveta lando post la revolucio kaj pri la diversaj urboj; raportas la spertojn de kelkaj landanoj, sed ĉiam elspiras tra la paĝoj, vera agrabla sento de amo al patrujo, de fiereco pro ĝiaj famaj lernejoj, ĝiaj sciencistoj, pro ĝiaj malnovaj urboj, pro la alta vivnivelo nun atingita. Adreso: Petro POLIŜŪK, Novo-Moskovskaja 18, kv. 15 TAŜKENT-52 UZBEKISTAN (U.S.S.R.).

TURISTA MONDO - Internacia turista revuo en Esperanto. "Turista Mondo" estas sensacia iniciato de D-ro HJ. UNGER (Zürich 22, Svislando). Ĝi estas la sola internacia turisma fak-revuo tute en Esperanto. Ĝia redaktoro estas ne nur profesia ĵurnalisto, sed ankaŭ specialisto pri vojaĝado. La dua numero de "Turista Mondo", kiu antaŭnelonge aperis, estas parte dediĉita al Vieno, la ĉijara kongresurbo. Tutjara abono (kvar numeroj) kostas 10 svisajn frankojn (2,50 Usonaj Dolaroj).

LA HOMO SUR SIA VOJO - (El Hombre en su Camino) Krestomatia lernolibro Hispana-Esperanto de Prof-ro Manuel FERNÁNDEZ MENÉNDEZ. Eldonis "La Bona Semisto" Montevideo (Urugvajo). La dulingva verko estas tre bona helpo por propagando kaj disvastigo de Esperanto. Samtempe ĝi utilas por la necesa diskonigo pri U.N.O., U.N.E.S.K.O., U.N.I.C.E.F., k.t.p. kaj la Homaj Rajtoj. Tiu bonega verko estas adaptenda, se eble kun plibonigoj, por la diversaj lingvoj kaj popoloj, sen priokupoj pro kopirajtoj, tial, ke ili apartenas al la Homaro. La granda laboro de la urugvaja Esperanto-pioniro, Prof-ro Fernández Menéndez, rezultigis mirindan ateston pri lia homaraneco kaj esperantisteco.

Opinioj de elstaraj gesamideanoj kaj recenzoj el gazetoj elmontras la gravecon kaj utilecon de la verko kaj konfirmas nian supran laŭdon.

NOVAJ BROŜUROJ KAJ FALDFOLIOJ EN ESPERANTO

TRENTO - Bunta Esperanta faldfolio kun granda mapo de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, eldonita de Azienda Autonoma Soggiorno e Turismo, Via Alfieri, 4 TR. CASTEL SAN PIETRO TERME - Luksa esperantlingva libreto kun multkoloraj fotoj pri la urbo kaj ĝiaj famaj Varmbanejoj. Ĝi enhavas ankaŭ mapojn de la urbo kaj de la regiono. Eldonis: Azienda Autonoma di Cura e Soggiorno di Castel S. Pietro Terme (Viale Terme 150) kunlabore kun Ente Provinciale per il Turismo di BOLOGNA (Via Marconi, 45).

NEKROLOGOJ

GIACOMO ROSE - Kun ega bedaŭro ni anoncas la forpason (okazintan la 27-an de februaro) de nia fidela membro Giacomo Rose. Li estis la plej malnova ano de nia Asocio, membro de FEI kaj ILEI; en sia junaĝo li kontaktiĝis kun la plej elstaraj personoj de nia Movado, italoj kaj eksterlandanoj, inter alie kun Edmond Privat. Li fervore laboris en Trieste, li gvidis kursojn en lernejoj kaj en la fervojista medio ĉe "Dopolavoro Ferroviario". Nia perdo estas granda. La Fervojistoj-Esperantistoj prezentas sincerajn kondolencojn al la Triesta E-Asocio kaj al familio de nia kara forpasinto.

ELFRIED MALMGREN - La 28-an de marto mortis en Stockholmo, 70-jara, Elfried Malmgren, postmilita prezidanto de U.E.A. (ni bone memoras lin kiam prezidis la 40-an Jubileon U.K. en Bologna dum 1955-a), kaj lia alte ŝatata edzino Linnea forpasis la saman tagon. La sorto volis ke tiu admirinda paro, kunligita dum la vivo per sennombraj fadenoj de amo, kamaradeco kaj kunlaboro, kune forlasu tiun ĉi mondon kaj evitigu unu al la alia la doloron de soleca postresto. Malmgren estis esperantisto dum preskaŭ duona jarcento, dum kiu li laŭstape plenumis ĉiujn oficojn en loka, nacia kaj internacia kadroj. U.E.A. elektis lin Honora Prezidanto en 1962-a.

PIETRO BISESTI - La 23-an de majo pro abrupta malsano subite ekmankis en Genova-Sampierdarena pioniro Pietro Bisesti, kunfondinto en 1921 de la loka Sampierdarena Esperantista Societo. Li naskiĝis la 2-an de majo 1896 en Intra-Zoverallo, sed ankoraŭ juna translokiĝis al Sampierdarena, kie li formis familion, kiu estas ekzemplon al ĉiuj esperantistoj: liaj gefamilianoj (edzino, du filinoj, gebofratoj kaj genepoj) estas esperantistoj. Bisesti kiel fervora esperantisto gvidis Esperanto-kursojn, verkis en Esperanto komedietojn kaj aliajn verkojn. La italaj esperantistoj bone konas lian simpatian figuron ĉiam ridetanta kaj bonhumora. Sincerajn kondolencojn al liaj gefamilianoj.

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO - Casella Postale 320, I-00100 ROMA. La dissendoj okazas de h.21,00 ĝis h.21,20 (M.E.T.). Faktestro: D-ro Renato CORSETTI. Ondlongoj: m:25,42; 30,90 kaj 41,24. La dua parto de ĉiuj dissendoj estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto"; la unua parto al la ĉi-subaj temoj:

SEPTEMBRO 1970-a:	2273	dimanĉon la 6-an:	Tra la literaturo
	2274	"	13-an: Novajoj el Italujo
	2275	"	20-an: Italaj kanzonoj en Esperanto
	2276	"	27-an: Leterkesto.
OKTOBRO 1970-a:	2277	dimanĉon la 4-an:	Floretoj pri Sankta Francisko
	2278	"	11-an: La itala urbo Lucca
	2279	"	18-an: La itala poeto Giacomo Leopardi
	2280	"	25-an: La reĝa palaco de Caserta.

5-MIL FOJE "PAROLAS VARSOVIO..." - La 4-an de aprilo 1959-a unuafoje aŭdiĝis en la etero la anonco: "Parolas Varsovio-naskiĝurbo de Esperanto!". De post tiam la signalo de la Esperanto-Disaŭdigoj de la Pola Radio sonis jam 5-mil fojojn. La 20-an de aŭgusto nunjare, je la 6,30 horo matene, Pola Radio disaŭdiĝis la 5000-an elsendon en internacia lingvo. La Esperanto-Disaŭdigoj de la Pola Radio estas la sola en la mondo ĉiutaga radioprogramo en la servo de la esperantistaro. Valoras subteni ĝin per aktiva aŭskultado, per leteroj, per kontribuado al ĝia programo. Post peto ĉiu ricevos detalan programon! Aŭskultu niajn disaŭdigojn kaj aŭskultigu aliajn! Popularigu inter la neesperantista publiko la programojn de la Pola Radio en la internacia lingvo. Skribu laŭ la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, VARSOVIO-1, poŝtkesto 46, Pollando.

DEZIRAS KORESPONDI: S-ino Maria ZIELIŃSKA, Partyzantów 3-1 GDANSK 6 (Polando), opera artistino, deziras korespondi pri arto, filozofio, turismo, ktp.